

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

JARABONO

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1994 — 4

(OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... Victor Schoelcher kontraŭ sklaveco...



... Kaj Esperanto en Afriko (fino)

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatanoj :

Pierre Babin

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Cajkovski	3
Transskribado de la homa penso (Luis Carlos) (fino)	4-6
Esperanto en Afriko? (B. Golden) (fino)	7-8
Kontraù-sklavismo: V. Schoelcher	9-10
La letargio de l'zuavo (R. Schwartz)	11-13
Por via distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

El Grésillon

La legado de la raporto de la lasta komitat-kunveno (pĝ 15), montras la provizoran bilancon de la jaro 1994 por la Esperanto-Domo. Ĝi ne estas pli malbona ol la antaùa sed, bedaùrinde, ankaù ne pli bona. Pri la rimedoj necesaj por rekreskado de la nombro da someraj aliĝantoj, la komitatanoj diskutis. Ili estis helpataj de la kritikoj kaj sugestaoj senditaj de legantoj post la apero de la artikolo en la 3-a numero 1994 de Kulturaj Kajeroj. La rimarkoj entenataj de la leteroj estis tre ofte trafaj. Ili plifortigis la opinion de la komitatanoj koncerne plurajn punktojn. Ili kelkfoje tuŝis temojn ĝis nun ne pritraktitajn. Entute la alvoko farita en Kulturaj Kajeroj estis fruktodona dank'al legantoj-amikoj, kiuj ĉiuokaze montras, ke ne gravas al ili nur la funkciado de la Esperanto-Domo sed ankaù la funkciigado. Kelkaj el la proponaĵoj estas realigeblaj sufiĉe rapide; aliaj, ne, pro manko de mono kaj de helpo. Almenaù unu dependas de vi: kial, tra la regionoj, la landoj, la mondo, ne ekzistus speco de reto de amikoj de Gresillon, kiuj propagandus por la Esperanto-Domo kaj por la revuo; tion faris jam unu el niaj perantoj. Ni havigus al ili la necesan materialon. Proponu vian helpon jam nun!

Ankaù unuope vi povas helpi. Venu al Gresillon, instigu viajn samklubanojn, viajn geamikojn, viajn korespondantojn al ĉeesto en iu aù alia stud-periodo. Abonu, abonigu Kulturajn Kajerojn, kiu, dank'al la laboro de grupeto da bonvolemuloj alportas al 600 legantoj, en 27 landoj, iom da grezijona aero.

Esperanto tra la Mondo

ESPERANTISTO RICEVIS NOBEL-PREMION- La Nobel-premio pri ekonomiko 1994 estis aljuĝita al tri profesoroj, inter kiuj estas Prof. dro Reinhart Selten, por iliaj studoj en la kampo de la teorio de la ludo (adaptita al la modelo de konkurenco). Prof. Reinhart Selten estas membro de Germana Esperanto-Asocio kaj de UEA. Li ankaŭ kunlaboras en Akademio Internacia de Sciencoj de San Marino, kiu uzas esperanton por siaj sesioj. Aliaj esperantistaj Nobel-premiitoj estis Joseph J. Thomson (fiziko 1906), Wilhelm Ostwald (kemio 1909) kaj Alfred Fried (paco 1911).

DUA ESPERANTA EŬROPUNIA KONGRESO Tiu kolektiva kongreso de esperantaj asocioj de Eŭropa Unio, okazos en Parizo dum Pentekosto 1995. Riĉa programo preparĝas kaj taŭgaj hoteloj estas proponitaj en la proksimeco de la kongresejo, kiu situas en Montrouge, ene de la fakultato de denta kirurgio. Aliĝu ĉe U.F.E., 4bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

S.A.T. kongreso: La tutmonda kongreso de S.A.T. okazos en Maribor (Slovenio) de la 15-a ĝis la 22-a de julio.

50-a SAT-AMIKARA KONGRESO: Tiu kongreso okazos en la kongresa kunvenejo de la alzaca urbeto Mittelwhir, de la 15-a ĝis la 18a de aprilo, en kunlaboro, por la organizado, de T.A.K.E. (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj).

80a UNIVERSALA KONGRESO DE UEA: La Prezidento de Finnlando, Martti Ahtisaari, akceptis la Altan Protektadon de la kongreso, kiu okazos en Tempere, de la 22a ĝis la 29a de julio.
La rektoro de la Internacia Kongresa Universitato, estos Dro Jouko Lindsted, profesoro pri slava filologio ĉe la universitato de Helsinki.
La antaŭkongresaj kaj postkongresaj ekskursoj kondukos la partoprenantojn al historiaj riĉaj kaj pejzaĝ riĉaj lokoj.

JUNULARA INTERNACIA KONGRESO: Tiu kongreso okazos de la 31a de Julio ĝis la 7a de aŭgusto, apud Sankt Peterburgo, kun la temo:" Aktivismo: junularo, kiu ne nur dancas ". Loka kongresa komitato: 51a IJK, p.k.34, Moskvo, Rusio 117071. Por eventuala kolektiva vojaĝo de la Francoj, skribi al JEFO ĉe UFE.

ESPERANTO DOMO EN JAPANIO: Japana esperantistino donacis al la japana esperanta movado trietaĝan kamparan esperanto-domon, kiu konsistas el tri partoj por studado, tranoktado, biblioteko kaj manĝado. La eksterlandaj esperantistoj estos bonvenaj en la domo, kiu estos fermita dum la vintro.

ESPERANTO DOMO EN BUDAPEŜTO: Tiu ĉi domo ne estos "turisma tranoktejo" sed ĉefe laborcentro kun modernaj instalaĵoj, loko por kursoj kaj malgrandaj seminarioj. La domo estis aĉetita de Lingvo-studio, la entrepreno, kiu financas la eldonadon de "Eventoj".

ESPERANTO SOCIETO EN HONG KONG: Internacia esperanta grupo nun funkcias en Hong-Kong. Adreso: Sino Margaret Fidow, Block 5, Flat 4a, Tak Chee Yuen, 88 Tat Chee Avenue, Kowloon Tong, Hong Kong.

LA SKOLTOJ AKTIVAS: Dum la somera Eŭropa Skolta Ĵamboreo, kiu okazis en Dronten (Nederlando), Skolta Esperanto Ligo (SEL) organizis du informbudojn, kiujn vizitis ĉirkaŭ 1 300 gejunuloj. La intereso estis granda. Trideko da skoltoj-esperantistoj interrilatis dum la kunveno. Venontjare, de la 1a ĝis la 11a de aŭgusto, samloke okazos Monda Skolta Ĵamboreo kaj denove SEL ĉeestos.

STIPENDIO LAPENNA: Fondaĵo Ivo Lapenna subvencios en formo de stipendio, disertacion je universitata nivelo, kiu temos pri esperantologio kaj/aŭ pri esperanto en rilato kun interlingvistiko. Informas Dro Klaus Perko, Lendkai 111, 8020 Graz (

ĈAJKOVSKI

"La artisto vivas duoblan vivon: la vivon de s-ro lu Ajn kaj la vivon de la artisto: sed ili ne ĉiam bone akordiĝas". La vivo de la artisto Ĉajkovski estas sufiĉe bone konata. Tiun de s-ro lu Ajn Ĉajkovski ni trovas tra liaj multaj leteroj: la homo estis timema, diskreta, sentema, malfacile eltenanta siajn samseksemajn inklinojn pro timo de skandalo. Lia muziko esprimplena, ritma kaj harmonia rakontas amon kaj malesperon, esperon kaj suferon.

Piotr Iliĉ, dua el ses infanoj, naskiĝis la 7-an de majo 1840, en vilaĝo apud la montaro Ural, kie lia patro estris minejon. Lia patrino estis francdevena. Ĉar neniu lernejo ekzistis en la vilaĝo, la gepatroj venigis edukistinon el Francio kaj la familio parolis la francan lingvon samlerte kiel la rusan. Piotr multe ŝatis Fanny, la edukistinon, kaj, kiam ŝi retiriĝis al Francio, li ofte vizitis ŝin. En 1848 la familio translokiĝis al Sankta Petersburgo, kie Piotr vizitis la liceon por fariĝi ŝtatfunkciulo. Li lernas ankaŭ pianludadon kaj kantadon. En 1854 lia patrino mortis pro ĥolero. Piotr multe amis sian patrinon; li estis ege ĉagrenita. Li daŭre studis en la liceo ĝis 1859, kiam li ricevis postenon en la Justic-ministrejo. Li tute ne interesiĝis pri sia laboro. Li plulernis pian-ludadon kaj harmonion en privata kurso. En 1863 fondiĝis en Sankta Petersburgo konservatorio, kies unua direktoro estis Anton Rubinstein. En 1866 alia konservatorio fondiĝas en Moskvo, estrata de la frato de Anton, Nikola Rubinstein. Tiu ĉi dungas Piotr kaj la du viroj fariĝas grandaj amikoj.

Piotr multe laboras pri sia unua simfonio; tiel multe, ke, por elteni la strecon li pli kaj pli drinkas alkoholon kaj nervoze sinkas. Li konsentis plene ripozi dum kelkaj monatoj kaj sukcesis fini la 1-an simfonion. Li enamiĝas al iu kantistino, Desirée Artot, sed li scias, ke li ne povas edziĝi al ŝi. Ili restas geamikoj, kaj Piotr rifuĝas en laboron. Li ne plu kursas en la konservatorio sed nur komponadas. Tiu periodo estas plej fekunda je famaj komponaĵoj, el kiuj la 4-a simfonio. En 1876 li konatiĝas kun Nadejda von Meck, tre riĉa virino, kiu helpis junajn muzikistojn per konsiloj kaj mono. Ŝi proponas al Ĉajkovski rentumon ĉiujaran; Piotr promesas, ke li neniam renkontos ŝin. Sed ili interŝanĝos multajn leterojn. La postan jaron Piotr sentas sin soleca. "Mi devas batali kontraŭ miaj emoj. Mi devas edziĝi al virino, iu ajn." Li edziĝas al Antonina Miljnkova. Ŝi scias, ke li povas doni al ŝi "nur simpation kaj dankemon". Fakte Antonina estis mense perturbata kaj dum 20 jaroj ŝi vivos en frenezulejo.

Ĉar li multe ŝatas la kamparon, en 1885 li ekloĝas en vilaĝo, kie, en bela granda domo meze de parko, li laboras tute kviete. Poste li turneas en la eŭropaj ĉefurboj, kaj konatiĝas kun Brahms, Grieg, Dvorak kaj kun la muziko de Beethoven. Li multe vojaĝas, ne nur pro muzik-amo sed ankaŭ por eskapi sin mem, sian kulpo-senton. En 1890 Nadejda von Meck skribas al Ĉajkovski, ke ŝi ruiniĝis kaj ne plu povas finance subteni lin.

Samjare Piotr iras al Usono, kie li renkontas grandan sukceson. Li ekkomponas la simfonion "Tragika", kiun ni nun nomas "Patosa". En oktobro 1893 ekaperas nova ĥolero-epidemio. Ĉajkovski (ĉu intence?), trinkas ne boligitan akvon. Li mortas post kvartagaj suferoj....kiel la patrino.

POR KE DENOVE FLORU LA PRAKTIKADO DE LA LINGVO ĈE GEKNABOJ DIVERS-NACIAJ DUM LA PRINTEMPA RENKONTO, JAM SEMU DUM LA VINTRO.

Sendu vian kontribuon al: Maison Culturelle Esperantiste, poŝtkonto Nantes 1485 39 P. "Fonduso Infan-renkonto"

Transskribado peralfabeta de la Homa Penso

(FINO)

En Arabio oni skribis la literojn per strekoj kvazaù tute kunigitaj. Iliaj formoj estis angulaj, kaj la riĉeco de la alfabeto malpli granda ol tiu de la nuntempa literaro. Tiu antikva alfabeto ricevis la nomon de "Kufa skribo", pro tio ke ĝi estis elpensita en la urbo Kufa de la viziro Molaĥ, en la jaro 993-a. Poste venis la "Neski", nuntempe uzata araba alfabeto, kiu konsistas el 28 literoj; ĝi estas legebla dekstre maldekstren; ĉiu el la 28 literoj havas kvar formojn diferencajn laù la pozicio de ili okupata ĉe la vorto eldirota: izola, komenca, meza aù fina; la sursignoj, nombre 14, estas figurataj ĉu unuope ĉu are sur iu granda nombro da literoj. La arabaj presliteroj estas malfacile kompostebla j, ĉar ili estas la ĝusta reprodukto de la litersignoj mane skribitaj, kaj ĉiuj estas kunigeblaj per "ligaturaj" signoj. La turka alfabeto malmulte diferencas de la araba kaj kalkulas 5 literojn pliajn.

La hebrea alfabeto konsistas el 22 literoj; sed tiuj literoj formas nur konsonantojn, kaj por vokalumi la lingvon oni uzis punktovokalojn; tiuj ĉi nombras 7, kaj estas lokeblaj supren aù malsupren de la liter-vokaloj. Plie ekzistas 24 signoj por la tonika akcentigo; tiuj signoj estas lokataj jen supre jen malsupre de la literoj. La hebrea lingvo estas legebla dekstre maldekstren. Por la kompostado tipografia, same kiel por la araba lingvo, la hebrea estas kompostebla polinie; poste oni surkompostas aù subkompostas la almeteblajn punktosilabojn. El la hebreaj alfabetoj estas derivitaj la sekvantaj: arĥaika, samaria, palmira, aramea, nabatea, siria, himjarita, araba, persa, kufi, neski, safiti, berbera,....

La diversaj popoloj el Egiptujo transformis, skribante rapide, la "Moizan alfabeton".

La najloforma skribo estis formata per najloj aù kojnoj dismetitaj diversmaniere. Tiuj strangaj multoblaj kombinoj de najloj formis konsonantojn kaj vokalojn. Tiuj literoj estis uzitaj en Azia Turkujo kaj Persujo, de la Medoj kaj Persoj; ili estas legeblaj maldekstre dekstren, kaj estis samtempe ideografiaj kaj silabaj. Ili estas facile kompostebla j tipografie kaj kalkulas grandan diversecon de tipoj; tiu alfabeto estas konata ankaù sub la nomo "babilona".

La etiopia alfabeto estas tre antikva kaj ĝia deveno iom mistera; ĝin oni nomas "absinia" aù "amharita", devene de la urbo Amhar, unu el la ĉefaj centroj en Abisinio. La moderna etiopia alfabeto multe diferencas je tiu en uzado dum la antikvaj epokoj; ĝiaj formoj estas pli kursivaj kaj komplikaj; ĝi estas legebla maldekstre dekstren, kaj ĝia kombinado konsistas el 26 konsonantoj-signoj kaj 7 vokalsignoj al kiuj oni devas aldoni 7 konsonantoj-signojn amharitajn. La kompostado tipografia tamen facila postulas egan atenton.

La armena alfabeto estis elpensita dum la V-a jarcento de Mesrob; ĝi estas legebla maldekstre dekstren kaj konsistas el 38 literoj; ĝi posedas grandan similecon kun la antikva etiopia literaro.


La greka alfabeto devenas de la fenicia, kiu naskis ankaù aliajn. La fenicianoj enkondukis sian skribmanieron en Beotion, el kie ĝi poste disvastiĝis tra tuta grekujo, 1 600 jarojn antaù Kristo. Dum la antikvaj epokoj ankaù la Grekoj skribis dekstre maldekstren per grandaj ĉefliteroj; tiu skribsistemo estis nomata "Bustrofedon". La Grekoj skribis maldekstre dekstren ĉe la komenco de la Homera epoko. Nur post longa tempo ili alprenis malgrandajn literojn, per kiuj nuntempe estas presataj la gazetoj kaj libroj. Por la fonetiko kaj pliakcentigo de la elparolo estas uzataj specialaj sursignoj; la greka moderna alfabeto konsistas el 24 literoj kaj 4 litersursignoj.

La rusa alfabeto devenas el

la greka kaj konsistas el 35 literoj. La Rusoj modifis kelkajn literojn kaj aldonis aliajn necesigitajn en la uzado de la lingvo; neniu el ili posedas sursignojn.

La kopta alfabeto, kiu posedas treegan similecon kun multaj grekaj literoj estis en uzado ĉe la Egiptoj post enkonduko de la Kristanismo; ĝi estas nuntempe uzata de la kristanoj por liturgiaj kantoj. Tiu ĉi alfabeto konsistanta el 32 literoj estas legebla maldekstre dekstren. El ĝi estas derivitaj, kun kelkaj aliformigitaj literoj, la alfabetoj serba kaj bulgara.
La sanskrita alfabeto estas unu el la plej perfektaj el ĉiuj lingvoj konataj. La Hindoj eĉ pretendis, ke la sanskrita skribo estis al ili transdonita de la Dioj. El tiu kredo devenas ĝia unua nomo: Devânagâri. La devânagâri multege disvastiĝis, kaj ĝiaj formoj estas retroveblaj en ĉiuj derivitaj sekvantaj alfabetoj en uzado en Hindio. La sanskrita tipografia alfabeto kalkulas 328 litersignojn.

La sanktaj libroj de Irano, konataj sub la nomo "Zenda-Avesta", estas skribitaj per zenda alfabeto, derivita de la sanskrita. Dank'al la penadoj de la Dano Rask, oni ricevis la eblon traduki tutplene la originalan tekston de la fama verko "Zenda-Avesta", kiun estis alportinta, tre zorge, el Hindujo, en la jaro 1762, S-ro Anquetil-Duperron. La alfabeto konsistis el 30 literoj-konsonantoj kaj 14 vokal-signoj. La sanskrita alfabeto tute diferencas de la hebreaj skriboj; ĝi konsistas el 14 liter-vokaloj aŭ diftongoj kaj 34 liter-konsonantoj; ĝi estas legebla dekstre maldekstren. La sanskrita alfabeto estas la elementa bazo de la alfabetoj de la popoloj de la Inda duoninsulo. La pali alfabeto, kiu estis la sakra lingvo de la Birmanoj ankaŭ devenas de la sanskrita, same kiel la siama, kies kvadrataj formoj de la sanskrita estas rondigitaj.



Frazkomenco de « *Patro Nia* » en la lingvoj: 1 rusa, 2 greka, 3 araba, 4 hebrea, 5 samaria, 6 siria, 7 babilona, 8 kopta, 9 etiopia, 10 sanskrita, 11 tibeta, 12 tamula, 13 armena.

La unua elemento de la ĥina alfabeto estis unue simpla streko kombinita diversmaniere; ĝi estis la unika elemento de la "trigamoj", kies elpenso estis alskribita al Fu-Hi, 3 460 jarojn antaŭ Kristo. Baldaŭ, al tiuj trigamoj postvenis signoj, pli aŭ malpli ĝuste reprezentantaj objektojn; tio estis la ĥina epoko de la hieroglifoj. La moderna ĥina skribo kalkulas proksimume 12 000 grupojsignojn, kaj el ili estas starigitaj 214 ŝlosiloj aŭ radiksignoj. La skribo moderna estas legebla supre malsupren. Ilia kompostado estas faciligata per literŝlosiloj, kiuj sciigas pri la uzotaj streksignoj.

En la jaro 1041 la unua preslitera alfabeto estis elpensita de forĝisto nomata Pi-Ching.

Nun pri niaj aktualaj eùropaj alfabetoj. Ili estas konataj, sed ni diros, ke oni povas ilin dividi en du periodojn; la unua, kiu datumas de la V-a ĝis la XII-a jarcento; la dua de la XIII-a ĝis la XV-a jarcento. Antaù la kristana epoko ekzistis en Irlando speciala alfabeto nomata "ogama". Ankaù en Anglujo ekzistis, antaù la almilitado de la Normandoj, alfabeto nomata "anglo-saksa", kies literoj tre similis nian nuntempan klasikan literaron. En Hispanio ekzistis iu alfabeto nomata "kelta-ibera", kunmiksaĵo el la latina, puna kaj fenicia alfabetoj. Nia nuntempa alfabeto estis elpensita ĉirkaù la jaro 1455 de S-ro Nicolas Jenson, gravur-isto.De tiu epoko ĉiuj ceteraj sinsekvintaj alprenis formojn pli aù malpli fantaziajn.

La gota alfabeto, kiu devenas el difektita latina alfabeto kaj estis kreita de fantaziemo, aperis en Francio ĉirkaù la XIII-a jarcento kaj poste fariĝis la nacia presliter-aro de la Germanoj. Ĝi estis tre uzata dum longa tempo de monaĥoj por la skribado de religiaj libroj; ĝi malaperis ĉirkaù la XVII-a jarcento post longa uzado ĉe la Italoj kaj Hispanoj, kiuj fine alprenis la latinan alfabeton, kiu tiam disvast-iĝis tra Eùropo kaj Ameriko. Ĝiaj progresoj estas tiom pli rimarkindaj, tial ke ĝi estas alprenita ne nur de popoloj loĝantaj en Ameriko kaj Aùstralio, sed ankaù altrudiĝis al popoloj, kiuj jam posedis sian propran skribon kaj estas uzata konkurence kun la gota alfabeto en Germanio kaj Svedio, kaj kun la slava alfabeto en Rusio.

Antaù ol konkludi, ni rimarkigos, ke ofte oni riproĉis al nia Esperanta lingvo ĝiajn sursignojn. Se la kritikintoj estus pli bone esplorintaj la historion de la eùropaj alfabetoj, ili estus tiam rimarkintaj, ke ne nur Esperanto posedas supersignojn, sed ke la plimulto el la ĉefaj vivantaj lingvoj, posedas sub-kaj supersignojn. Ni citu ekzemple kelkajn el ili: ĉeña, kroata, itala, hispana, portugala, pola, rumana, sveda, hungara,k.t.p.; eĉ en la "tagala" lingvo estas uzataj la sursignitaj, kvazaù esperantaj, literoj ĉ, ĝ.

Tiam konkludante, ni diru, ke se oni starigus landkarton de ĉiuj alfabetoj, ili estus divideblaj laù kvin ĉefaj sekvantaj tipoj: Oriente, la araba, kiu altrudiĝis al ĉiuj popoloj el Korana kredo, de la landlimo de Ĉinio ĝis la okcidenta marbordo de Afriko, kaj la hinda alfabeto; Okcidente, la romana-latina alfabeto, kiun alprenis la plimulto el ĉiuj popoloj loĝantaj en Eùropo kaj Ameriko; intertempe la greka alfabeto, aliformiĝante, fariĝis tiu de la slavaj popoloj; kaj fine, Norde, la gota alfabeto, kiu estas devenaĵo el la latina.

La latina alfabeto tiel disvast-iĝis ĉu per la helpo de la komercado, ĉu per la literaturo, kaj transiris siajn naturajn limojn; per la forto de aferoj ĝi fariĝis la alfabeto de la mondo civilizita!

Tiu emo kunigi ĉiujn alfabetojn en unu solan montriĝas, kiel kon-sekvenco de la konstantaj kaj sen-haltaj penadoj de la homo por atingi esprimmanieron, kiel eble plej simplan kaj universalan de la parolo. Tia estas la triumfo de la latina alfabeto. Sen ia dubo ĝi estas malpli perfekta ol la egipta skribo, sed ĝi respondas pli bone la bezonojn por kiuj ĝi elaperis, tial ke ĝia simpleco faris ĝin alfarebla por preskaù ĉiuj lingvoj, ol por celo al kiu ĝi estis iam difinita, kaj tiel trafege fariĝis kvazaùdire la transskribilo de la homa penso; same kiel Esperanto fariĝos la universala interkomprenilo de ĉiuj popoloj, tiel la latina alfabeto povas esti rigardata kiel ĝia kompletigo: unu sola alfabeto por unu sola lingvo!

(Parolado farita de Luis CARLOS, fondinto de Internacia Ligo de la Esperantista Preslaboristaro - 1922)

ĈU ESPERANTO EN AFRIKO ?

3- Pasantaj lernantoj, nekonstantaj instruantoj - Eĉ se okazas favora situacio, kaj instruado komenciĝas en lerneja kurso aŭ en klubo, la granda problemo, kiun alfrontas la organizantoj estas, kiel reteni la intereson de la novaj lernantoj. En raporto pri la "konfuza Esperanto-movado" de Madagaskaro en 1978 (7), estis akcentite, ke "kvankam ĉiujare la lingvon lernas nova cento da interesitoj, estas malfacile teni ilian intereson (pĝ 89). Tio signifas, ke tre ofte en tiu lando oni devas komenci de nulpunkto. Kiel povas okazi progreso en tiaj cirkonstancoj? Edward Symoens (8) pentras simile mornan bildon de la situacio en Rùando. Li priskribas, kiel eùropanoj venas al tiu lando, faras propagandajn prelegojn kaj kolektas kelkajn interesitojn por kurso.

"La problemo post tiuj prelegoj estas kiamaniere daùrigi kaj ekspluati la vekitan entuziasmon. Kiel mobilizi la dekojn da interesitoj? Kiel instigi al aktiva lernado de la lingvo? Tio ne eblas sen minimuma organizado de la disponeblaj fortoj kaj sen edukado de kelkaj profesiaj instruistoj."

Symoens aldonas, ke ne eblas organizi ampleksan korespondan kurson inter Rùando kaj Belgio aŭ Nederlando, unue pro manko de korektantoj, due pro tro altaj kostoj, trie pro la fakto, ke tro malmulte da homoj daùrigus la kurson. Kiomofte ripetiĝas jen en unu lando, jen en alia, tiu sama malkuraĝiga sinsekvo de eventoj. Vere, ĝi estas la eterna problemo de la instruado de Esperanto en Afriko kaj ankaŭ aliloke en la Tria Mondo.

Pligrandigas la malfacilaĵojn krei vivkapablan Esperanto-movadon en afrikaj landoj la situacio de la organizantoj de instruado. Se temas pri eùropanoj, ili kutime estas unuopuloj, deĵorantaj en Afriko dum limigita periodo de tempo. Se ili ne sukcesas trejni homojn kapablajn daùrigi la instruan kaj organizan laboron, antaù ol ili reiros al la hejmlando, tiam estiĝos vakuo, kaj disfalos la tuta embria movado, kiun ili ekformis. Ekzemploj troviĝas en pluraj afrikaj landoj. Eĉ se unuopuloj de eùropa deveno restas longtempe surloke en Afriko, tio ne certigas kontinuecon de la agadoj, kiujn ili iniciatis. Hans Bakker (9) entuziasme raportas, ke la porinstruista kolegio de Adeyami en Nigerio "fariĝis ŝaùmanta fonto de aktiveco pro la agado de unu sperta esperantisto." En dua artikolo (10) li pli detale portretas ŝin. Tiu unuopulo estas aùstrianino, kiu "...ne nur instruas klase kaj koresponde, prelegas, informadas, preparas lernomaterialon, starigas bibliotekon, verkas referaĵon por la Universitato pri la nigeria lingvo-problemo kaj publikigas ĉiusemajne "Esperanto-leteron", sed finfine ankaŭ havas siajn "normalajn" devojn kaj taskojn." Jen potenciale danĝera situacio, ĉar ĉion faras unu sola persono. Kiom longe povas daùri tiu sindediĉo? Ĉi-kaze tre mallonge, ĝis 1984(11) Kie estas la afrikaj kadroj, kiuj transprenos la gvidrimenojn de la eùropaj organizantoj de iliaj movadoj, kluboj kaj kursoj? Ankaŭ aliaj faras la saman demandon. Priskribante la situacion en Rùando, Edward Symoens informas, ke "Ruanda Esperanto-Asocio vivas kaj prosperas. Ĉio estontece dependas de la membroj mem. Ni povas havigi al ili dokumentojn, librojn, revuojn, sed la disvastigo kaj firmigo de la movado en Rùando estas afero de Rùandanoj" (pĝ 68).

Laù la lastaj novaĵoj, minimume kvindek personoj en Rùando sekvas kurson aŭ daùrigas la memstudadon de Esperanto. Tamen, en la plej freŝdata Jarlibro de UEA (1993) ne troviĝas Rùanda Esperanto-Asocio, do oni povas demandi, ĉu ĝi ne estas ankoraŭ unu el la surpaperaj afrikaj Esperanto-organizaĵoj. Estus interese kompili statistikojn ĉiujare pri la nombro de rùandanoj ankoraŭ lernantaj Esperanton, por prognozi, kiam ilia movado plene

indiĝeniĝos. Mi mem estas skeptika pri la enradikiĝo de stabila Esperanto-movado en tiu lando sen daùra apogo de eùropanoj. La spertoj de la pasintaj jardekoj montras, ke la interesiĝo de afrikanoj pri Esperanto estas efemera. Bernard Golden emfazis tiun fenomenon en sia artikolo "La parabolo de la tri korboj"(12) similigante la afrikan Esperanto-movadon al truhava korbo. Homoj, same kiel karboj en la korbo, eniras la movadon, pasigas iom da tempo tie kaj poste elfalas. Ili neniam restas sufiĉe da tempo por fari utilan kontribuaĵon. Oni replenigas la korbon kaj la movadon, kaj la procedo ripetiĝas.

4- La sola efika maniero instrui Esperanton al afrikanoj: Por tiuj, kiuj obstine opinias, ke oni ĉiuokaze devas porti Esperanton al la afrikanoj nun, mi proponas, ke ili ne plu malŝparu sian tempon en Eùropo, ellaborante belajn sed nerealigeblajn planojn. Ili aktiviĝu same kiel religiaj misiistoj en diversaj regionoj de la Tria Mondo, preparante sin por vojaĝo al unu el la landoj kaj restado tie dum 20, 30 aù eĉ 40 jaroj. Surloke ili starigu lernejojn, konstruu malsanulejojn, planu agri-kulturajn bienojn kaj fondu indus-triajn entreprenojn. Dum la indiĝenoj ricevas ekonomiajn kaj edukajn avantaĝojn, oni povas ankaù instrui Esperanton. Estas akcentende, ke temas pri longdaùra, persista laboro fare de homoj, kiuj estas pretaj oferi ĉion por la idealo de Esperanto. Tiu ĉi speco de preskaù vivdaùra kampanjo posedos kontinuecon, tre bezonatan trajton, kiu ĝis nun mankis en ĉiuj provoj enkonduki Esperanton en Afrikon.

Ankaù Tibor Sekelj faris similan proponon en sia detala plano por la disvastigo de Esperanto en la Tria Mondo (13). Li proponis, ke iru al la koncernaj landoj kursgvidantoj kapablaj instrui Esperanton " per lingvo konvena al la koncerna medio". Tio signifas, ke oni devas instrui per unu el la lokaj indiĝenaj lingvoj, ne per ekskolonianta lingvo. Kiom da esperantistoj en la mondo hodiaù ne nur kapablas instrui Esperanton sed ankaù pri-majstras indiĝenan lingvon de Afriko aù Azio? Tiu ĉi parto de la plano de Sekelj tute ne estas realigebla, krom se indiĝenoj, en ĉiu koncerna regiono, lernas Esperanton kaj instrumetodologion pri fremdaj lingvoj por povi roli kiel kurs-gvidantoj. Sed mi montris en tiu ĉi eseo, ke ĝis nun ne estis eble trejni tiujn indiĝenajn kadrojn, kies tasko estas tiri la embrian afrikan Esperanto-movadon el la neelirebla cirklo, ĉar mankas la fundamenta kondiĉo por sukcesa lingvolernado: motiviĝo. Ĝi venos eble, kiam Esperanto estos oficiale uzata de pluraj eùropaj, aziaj kaj amerikaj ŝtatoj kaj ankaù grandaj internaciaj organizaĵoj. Tiam estos tempo pensi denove pri la maniero enkonduki Esperanton en Afrikon.

Notoj

7. Simo MILOJEVIĆ. Fari sian laboron signifas ne fari sufiĉe. Esperanto, majo 1978: 89, 90.

8. Edward SYMOENS. Ankaù en Ruando ekviglas la Movado. Esperanto aprilo 84

9. Hans BAKKER. Esperanto-asocio ankaù en Benino. Esperanto, feb. 84

10. Hans BAKKER. Movada kerno en la nigeria Ondo. Esperanto, julio 83

11. Bernard GOLDEN. Rekrutado de verdaj misiistoj por Afriko. Svisa Esperanto-Revuo julio 1988.

12. Bernard Golden La parabolo de la tri korboj. La Kancerkliniko, 28/1983.

13. Tibor SEKELJ. Plano por la disvastigo de Esperanto en la Tria Mondo. Esperanto, julio 1982.

Reviziita: januaro 1994.

Bernard GOLDEN

KONTRAŬ_ ŜKLAVISMO

La 5-an de februaro 1794 la ankoraŭ juna franca revolucio voĉdonis la abolicion de sklaveco. Sed tiu registara decido efektiviĝis nur pli ol 50 jarojn poste. Tiom da profitemoj kontraŭis tiun dekreton politikan, ke kelkaj homoj devis batali por iom post iom altrudi ĝian aplikon. En 1802 dekreto de Bonaparte diras: "sklaveco estos konservata laŭ la leĝoj kaj reguloj ekzistantaj antaŭ 1789." Nur en 1848 aperis dekretoj de la II-a respubliko, kiuj diras: " konsiderante, ke sklaveco estas atenco kontraŭ la homa digno"...dekretas:" sklaveco estos komplete abolici ita en ĉiuj francaj kolonioj kaj teritorioj du monatojn post la proklamado de tiu ĉi dekreto. Ĉiu korpa puno, ĉiu vendado de homo ne libera estos tute malpermesita,." Sekvis la detaloj pri la aplikado kaj la eventualaj punoj por la kolonistoj, inter kiuj, "perdo de franca civitaneco." Sed la dua respubliko ne vivis tre longe kaj, kvankam la dekretoj ne estis nuligitaj, iliaj decidoj ne estis vere aplikataj. Intertempe aliaj landoj faris decidojn kontraŭ sklaveco: Britio, Usono, Nederlando, Portugalio, Vatikano. Sed tiuj decidoj ne tuj ĉesigis sklavkomercon, kiu daŭris, pli malpli kaŝe, dum multaj jaroj.

El la homoj, kiuj, en Francio, akre batalis kontraŭ sklaveco kaj "patris" la dekreton de 1848, estas Victor Schoelcher. Hazarde, oni celebras preskaŭ samtempe la aperon de la unua kontraŭsklaveca dekreto (5-2-1794) kaj la datrevenon de la morto de Schoelcher (25-12-1893).

Victor Schoelcher naskiĝis en 1804, la jaron, kiam Bonaparte fariĝis Napoleon. Lia patro estis fabrikanto de porcelanaĵoj en Parizo. Al li Victor ŝuldis vivon komfortan kaj senzorgan, kaj grandan amon al libero. Kiam kolapsis la Imperio Victor estis ĵus enirinta liceon Louis-le Grand. La tiamaj gejunuloj ne akceptis, ke reĝeco revenis. Ili sopiris pri "pli bonaj tempoj" kaj, por prepari la estontecon, aniĝis al Asocioj, kiel la Asocio por la Homaj Rajtoj, aŭ framasonaj loĝioj. En tiuj asocioj kaj loĝioj oni kontestis, diskutis, interŝanĝis ideojn. Oni faris proponojn por plibonigi la vivon de la tiujarcentaj homoj, kaj pluraj el tiuj proponoj poste fariĝis registaraj dekretoj.

Ĉar Ameriko tiam malfermis novan merkaton por la pariza komerco, Victor estis sendita de sia patro al Meksikio kaj Antiloj. Li revenis Francion kun kapo plena je impresoj kaj indignigaj pripensoj. Ĉar li konatiĝis kun la vivkondiĉoj de la nigraj sklavoj. En la francaj "posedaĵoj" regis la regresema dekreto de Bonaparte. Tiam Victor Schoelcher komencis batali kontraŭ sklaveco. En Britio la Parlamento, dank'al la persista ago de Wilberforce, voĉdonis leĝon (1807) malpermesantan sklavkomercon kaj eĉ pligravigis la punojn en 1811. La brita marŝiparo kontrolis ĉiujn ŝipojn, sed tion ne rajtis fari koncerne la landojn, kiuj ne adoptis kontraŭsklavecan leĝon.

Victor Schoelcher kaj liaj amikoj reprenis la tradicion de la "Amikoj de la nigruloj", societo fondita jam en 1789, sed kies agado, post dumrevolucia sukceso, spertis falon en la mallumon. Per artikoloj kaj libroj li plifortigis la agadon kaj lia vendejo fariĝis kvazaŭ oficejo de homama organizo. Feliĉe, dum la "julia monarkio", eniris la Parlamenton multaj membroj de la franca Societo por la Abolicio de Sklaveco. Tiam Victor Schoelcher vendis la patran fabrikon intertempe hereditan. La vendoprezo certigis al Victor komfortan vivon kaj la eblecon vojaĝi cele al la kontrolado de la situacio de sklavismo en la mondo. Lia batalo altiris kontraŭ li malamikecon de la konservativuloj. Sed, aliflanke, li ricevis neatenditan apogon de la sukerbeto-kultivistoj; tiuj ĉi timis la importadon de la kansukero! Kvankam ne tre idealisma, ilia subteno multe helpis.

Schoelcher revenis de Gambio unu monaton post la naskiĝo de la II-a Respubliko. Li tuj vizitis sian amikon Arago, komisaro pri Maraj Aferoj. La postan tagon aperis dekreto simila al tiu de 1793, tute forgesita:"...neniu franca teritorio rajtas havi sklavojn. La sklavsistemo estas elpelita el ĉiuj francaj kolonioj kaj teritorioj. ...Ĉia korpa turmentado, ĉiu vendo de individuoj estas malpermesita."


La koloniistoj, la konservativuloj koleras kontraù . Schoelcher kaj akuzas lin pri ribel-instigo kaj eĉ masakro-kulpo. Victor estas elektita deputito, ne en Parizo, sed samtempe en Martiniko kaj Gvadelupo. Li faris plurajn proponojn, kiuj celis la plibonigon de la vivo de simplaj homoj; ekzemple, estis akceptita lia propono, ke la triaklasaj vagonoj estu fermitaj kaj kovritaj!

Sed novaj ribeloj preparîgas, ĉar la nova registaro, elektita en aùgusto 1848, malpli "revolucia", anoncas la malaperon de la Naciaj Laborejoj kreitaj por eviti senlaborecon. En Parizo, stratoj estas baritaj de la ribelantaj laboristoj. Victor Schoelcher forte riproĉis la Nacian Asembleon pro ĝia egoismo, kiu lasas grandan parton de la laboristaro sen vivrimedoj. Sed li samtempe riproĉas la ribelantojn pro agado kontraù Asembleo laùleĝe elektita. Generalo Cavaignac "obeigas" la ribelantojn.

Louis-Bonaparte, elektita prezidento de la Respubliko, provas moderigi la tro fervorajn konservativulojn. Sed tiuj ĉi elektis lin okaze de la balotado kaj li estis devigata akcepti kontraù-respublikajn decidojn. La 2-an de decembro 1851, Louis-Bonaparte fariĝis la 3-a Imperiestro de la Francoj. La respublikanoj starigis rezistan komitaton. Apartenis al tiu komitato, kun aliaj, Victor Hugo kaj Victor Schoelcher. Dum kvar tagoj la soldatoj "purigas" la stratojn, eĉ la domojn. La venkitaj ribelantoj estas devigataj ekziliĝi al Belgio kaj Anglujo. De tie, same kiel V. Hugo, Schoelcher skribas kaj diskonigas pamfletojn.

Kiam la reĝimo de Napoleono la 3-a montriĝis nekapabla eviti la militon kaj poste venki, la franca popolo reagis. La 4'-an de septembro 1870 la respubliko estis restarigita. Victor Schoelcher revenis. La Imperiestro estis malliberigita de la prusaj trupoj en Sedan. La Nacia Gvardio estis refondita kaj Victor Schoelcher estis nomumita kolonelo, ĉefo de la stabo. Post la armistico (26-01-71), ne akceptita de Victor Hugo kaj Victor Schoelcher, la komercistoj kaj la kampo-posedantoj ligiĝis kun la monarkistoj kontraù la respubliko. La registaro decidis la malaperigon de la Nacia Gvardio. Eksplodis la Komunuma Ribelo. Sed la armeo venkis post du monatoj kaj post la morto de pli ol 20 000 batalantoj. 60 000 pliaj ribelantoj estis deportitaj.

En 1875 Victor Schoelcher estis elektita porviva senatano. En tiu asembleo li daùrigis la batalon per gazetartikoloj kaj libroj. En 1880 li faris deklaron en la Senato pri sklaveco en Senegalo. Denove li estis la "malamiko" de la koloniistoj, sed multaj eksterlandaj vizitantoj venis por saluti la veteranon de la porrespublika batalado. Li mortis la 25-an de decembro 1893. Por multaj homoj li fariĝis speco de laika sanktulo.



La letargio de l' zuavo

Raymond Schwartz

Ni sidis ĉirkaù trinkeja tablo. Honestaj temperamentoj, kiel tion atestis nombro de l'subteleretoj senhalte kreskanta, laù kiu la kelnero poste ciferigos nian kotizon. La loko estis bonfame konata. Nenia soifo kapablus elĉerpi ĝiajn barelojn, kaj la kvalito de ĝiaj fluidaĵoj meritis laùdon. Krome - kaj tio dum nia ĵazbanda karuselepoko ne ŝajnas tro taksebla - tiu honorinda trinkbutiko ne havis orkestron.

Mi estu rostata, kiel vulgara haringo, se mi malbenos la muzikarton. Sed en trinkejo, kie homo kun bona reputacio neniam sidas sola, en trinkejo, meze de amika rondo ŝprucu pensoj kaj sonore envortiĝu eĉ intimaj konsideroj. Fajre flagru la parolo dum klingebrua skermo de l'ideoj. Tie muziko ĝenus. Je via sano!

Akre ni diskutis tiun tagon pri misteraj fortoj de l'spirita mondo. Akre, sed kiel diletantoj. Kaj, kiel ĝenerale inter nefakuloj, tre ofte revenis vortoj teknikaj: hipnoto, mediumo, eĉ ektoplasmo, kiujn precize difini certe neniu el ni scipovis. Apoge je iu mirrakonto pri "aùtentika" fenomeno, oni citis Flammarion kun Conan Doyle kaj aliajn aùtoritatojn. Kaj sinsekvis pri fantomaj noktoj raportoj, kiuj alportis nenian solvon, sed lasis nin dolore ŝvebantaj super oscedanta abismo de l'eterna mistero. Iom post iom invadis nian dubantan animon funebra noto, tima sento antaù la granda demandopunkto, kiujn forblovi sukcesis nek plej densa fumnubo el niaj viraj pipoj, nek malkara rikanado afektanta superan pliscion. Tiam Dubois, nia simpatia amiko, forviŝis unu larmon kaj malfermis la buŝon. Ĉi tiun fojon por paroli.

"Ĝi estas la plej malagrabla rememoraĵo el mia vivo," li komencis, kaj ni havis la impreson, ke li parolas ne volontvole sed kvazaù sub premo de l'atmosfero, kiun kreis nia ĵusa diskutado. Ni tre nete sentis, ke tiu homo kaŝas en sia plejprofundo ian sekreton, kiun, nun, malgraù si, li liveros al ni. "La afero komenciĝis per ŝerco, banala ŝerco en kazerna ĉambro. Sed, kiel vi vidos, la konsekvencoj estis teruraj, katastrofaj."

Tio okazis en la jaro 1916, dum septembro. Post pli ol unujara militado sur diversaj punktoj de l'batalfronto, kie mi akiris modeste la galonon de kaporalo, oni delegis min al Fontainebleau, kie mi sekvu kurson por fariĝi oficaspiranto. Tie nin reprenis la ĉarmo de l'vivo. Jam la unuan semajnon mi havis okazon konatiĝi kun aminda, belega knabino. Dank'al ŝi mi pasigis la plej ravajn horojn el mia vivo. Kaj se vi bonvolus memori kiom sobre mi ĝenerale dozas mian admiron, vi facile konkludos el tiu superlativa sincero, kion por mi signifis tiu ĉarma knabino. Bedaùrinde, mi ne povis ŝin vidi sufiĉe ofte, ĉar severa disciplino nin tenis de l'frua mateno preskaù senpaùze ĝis la signalo de l'enlitiĝo. Nur dimanĉe mi povis dediĉi la posttagmezon al mia feino. Tamen, ankaù en niaj barakoj ni pasigis tre agrablajn vesper-horojn. Ĉiuj ni estis junaj kaj rapide amikiĝis. Ĉiuj kamaradoj sin montris tre simpatiaj. Ĉiuj...krom unu.

Tiu unu nomiĝis Jules Lambecq. Li estis viro pli maljuna ol ni. Pli serioza. Preskaù funebra. Unu el tiuj homoj, de kiuj vi instinkte fortenas vin. Liaj malgajaj okuloj kuŝis en profundaj kavoj, en ombro de tro densaj brovoj. Fuĝemajn okulojn li havis, kiuj evitis rektan rigardon. Sed, kiam hazarde vi kaptis ilin, vi sentis kvazaù magnetan fluon, elektran tremeton tra via korpo. Entute, malagrabla kunulo, kiun ni kaŝe kromnomis "la hipnotisto".

Iun vesperon li aùdis tiun kromnomon. Li ridetis mistere kaj diris:" Vi estas pravaj. Mi multe okupiĝis pri hipnoto kaj eĉ atingis kelkajn rezultatojn." Nia bona amiko Jean Bonnet scivole interesiĝis. Kaj pli ol kutime Lambecq, la hipnotisto, fariĝis komunikiĝema. "Se vi volas ni faros eksperimenton. Ĉu, ekzemple, vi konas iun en la

najbara barako?" Jean Bonnet, kiun ni simple nomis la zuavo, ĉar li venis el zuava regimento, tuj proponis: "Jes, tie estas mia samurbano Pipollet." "Bone," Lambecq parolis ceremonie," mi petas silenton por kelkaj minutoj." Kaj flustre li maĉis la sekvantajn vortojn dum li apogis sian pintan mentonon sur la dorsflankon de l'manoj kunplektitaj:" Pipollet, aùskultu min! Mi volas, ke vi aùskultu! Pipollet, venu tuj ĉi tien! Tuj. Nu, venu. Unu, du...tri!". Ni streĉe atentis. La zuavo kaŝis en sian barbon (li portis la klasikan barbon de l'antikvaj zuavoj) malican rideton. "Pipollet, venu!" vibris tra preskaù preĝeja silento la ordono de Lambecq. Ni atendis longe. Sed vane. Pipollet ne povis veni ĉar, kiel la zuavo klarigis poste, li tiun vesperon havis forpermeson kaj je tiu horo ebriiĝis en la urbo. La ridantoj kompreneble estis ĉiuj kun la zuavo, dum Lambecq, sentante la mokon, enlitiĝis senvorte.

La sekvintan tagon la zuavo konfidencis al mi:" Ĉu vi kredas je la magiaj fortoj de tiu fuŝulo? Kia infanaĵo, ĉu ne? Sed ni kunhelpu al la farso. Hieraù mi ĉikanis lin, hodiaù mi akcelos. Mi aranĝos la aferon kun la dika serĝento el la apuda barako." Tiel okazis, ke la vesperon ni petis Lambecq, ke li bonvolu reprovi eksperimenton. Komence, li rifuzis, sed vidante mian sinceran sciavidon, li fine konsentis, des pli, ke la mokema zuavo hodiaù neniel intermiksiĝis. "Nu," diris Lambecq, "proponu iun el alia barako, sed iun, kiu efektive troviĝas tie."-" La dikan serĝenton!" mi tuj menciis, "mi estas certa, ke li ne foriris, ĉar ĵus mi ankoraù vidis lin."-" Bone," Lambecq akceptis, "kiel li nomiĝas?"- "Tion mi ne scias. Oni ĉiam diras "la dika serĝento"."- "Nu, se vi volas," kaj Lambecq daùrigis:" Mi petas silenton. Dika serĝento, aùskultu min! Mi volas, ke vi aùskultu! Dika serĝento, venu ĉi tien. Tuj. Mi ordonas. Unu, du..." Kaj jen, proprakorpe la dika serĝento envenis. Estas vere, ke laù antaùa interkonsento kun la zuavo li estis atendinta la signalon ĉe la pordo. Ĉiuj, kiuj nenion sciis pri la antaùaranĝo, ekmiris kaj longe forgesis refermi la buŝojn. Pleje, versajne, miris Lambecq pri sia sukceso. Kaj unu el ni naive demandis: " He serĝento, kion vi serĉas en nia barako?" Kaj la dika serĝento laù sia rolo konfesis:" Kion mi serĉas? Fakte mi ne scias. Subite mi havis la ideon veni ĉi tien. Sed, verdire, mi venis sencele kaj mi nun eĉ demandas min, kion mi faras ĉi tie." Tiam Lambecq diskrete triumfis. Tra la profundaj sulkoj de lia "hipnotista" masko glitis memcerta rideto kaj lia aùreolo glore briletis. Ankaù la zuavo estis kontenta. Lia enscenigo sukcesegis.

Kompreneble la zuavo denun reeldonis sian ŝercon preskaù ĉiuvespere. Lambecq, la mistera, laù niaj petoj venigis iun kamaradon el diversaj, eĉ tre malproksimaj barakoj. Neniam iu, nek li, nek la aliaj, krom la aktivaj aktoroj, suspektis la mistifikon. Kial, unu tagon post laciga ekzercado sur manovrokampo, la zuavo provokis?

"He, Lambecq, ĉu vi ne povus nun dormigi min dum kelkaj minutoj kaj sugestii al mi, ke mi ne plu estas laca?" Lambecq hezitis. Versajne li sin demandis, ĉu en tiu invito de l'zuavo ne embuskas nova moko. Dum unu momento iliaj rigardoj sin reciproke penetris. Kaj Lambecq superece konsentis: "Laù via plaĉo. Rigardu vian liton. Ĉu vi ne opinias, ke estus bone kuŝiĝi iomete? Dormi nur kvin minutojn? Forigi el viaj rompitaj membroj tiun pezon, tiun malagrablan rigidecon?" La zuavo efektive, turnante nun la dorson al Lambecq, alridetis sian liton kun stranga brilo en siaj okuloj. Sed ankoraù li staris samloke, senmove, kvazaù alnajlita al la planko. Tiam Lambecq, kies tuta volpovo ardis el la okulkavoj sub la tro densaj brovoj, fikse rigardis la nukon de l'zuavo. "Jes," li siblis, dolĉe, loge," jes, mi scias, vi nun deziregas dormi. Dormegi. Nur kvin minutojn. Tuj. Tuj vi iros. Kiam mi diros tri. Estos bone. Ripozi. Do, iru! Unu, du..."

La zuavo alproksimiĝis al sia lito per aùtomate mezuritaj paŝoj, tiel perfekte, ke mi dubis, ĉu li rolas aù ne. Kaj kiam Lambecq insiste trenis la voĉon tra tiu triiii...la zuavo kuŝiĝis kaj ekdormis. Regultakte, peze li spiris. Lambecq eltiris el sia poŝo sian horloĝon kaj de tempo al tempo li malrapide parolis: "Kia volupto! Kia bonega ripozo! Novaj fortoj fluas tra viaj vejnoj. Tiu dormo vin renovigis!" Li formetis sian horloĝon. "Sufiĉe. Vi sufiĉe dormis. Nun vekiĝu!" La zuavo ne moviĝis. "Bonnet, vekiĝu! Mi ordonas, ke vi revenu al la vivo. Unu, du, triii..." La zuavo ne moviĝis. Neniu trajto de l'vizaĝo, kiun mi akre observis, perfidis rideton. Ĉu li ŝercis? Lambecq provis plurfoje per hipnotaj formuloj liberigi nian amikon. Sed vane. "Nekompreneble! Neniam io simila okazis al mi. Verŝajne estas letargio. Bonnet, vekiĝu! Mi volas!" Vane. Kelkaj el ni sin preparis por skui la zuavon, sed Lambecq diris, ke perforta veko havus plej gravajn konsekvencojn. Mi ekgenuis apud Bonnet kaj flustris en lian orelon: "He, Joĉjo, se estas farso, movu vian dekstran piedon." La dekstra piedo ne moviĝis. Pli kaj pli ni timis. La afero estis serioza. "Kion mi pleje timas," diris la hipnotisto," estas, ke ekdorminte sub mia voloforto, li ne povos vekiĝi per si mem." Lambecq plurfoje aplikis sian tutan arton, jen flate-invite, jen ordone-komande. Sensukcese. Jam de longe la trumpet-signalo estis anoncinta la horon de l'lumestingo kaj enlitiĝo. Subite la pordo de nia barako malfermiĝis kaj enmarŝis nia kapitano, Marbache, la plej severa kaj malbona estro, kiun ni iam havis. Ĉiuj ekstaris la manoj premitaj kontraù la pantalono, kaj fikse rigardis la kapitanon. Ĉi tiu sin turnis al mi:" Kion tio signifas? Oni ŝajne bone amuziĝas ĉi tie. Kial vi ankoraù ne enlitiĝis? Ĉu vi ne aùdis la signalon?" Kaj mi devis respondi:" Pardonu, sinjor' kapitano, sed ni okupiĝis pri la zuavo Bonnet, kiu falis en letargion.." " Kion vi rakontas? Vi ŝajne mokas min, he kreteno! Vi pripensos tion en la karcero!" Nur nun, efektive, mi rimarkis, ke la zuavo Bonnet staras en la vico, je sia loko, kiel la aliaj, respektrigida. Kaj restas fakto: mi tiuokaze rikoltis 8 tagojn en nigra karcero. Jen!

Ĉirkaù nia trinkeja tablo oni ridis kaj diversmaniere komentis la misaventuron de nia amiko Dubois. Sed al ĉiuj la mistero ŝajnis facile klarigebla. La zuavo Bonnet komence intencis verŝajne nur mistifikon kaj troviĝante sur sia lito, post lacigaj manovrekzercoj li malgraùvole endormiĝis. Li vekiĝis kiam, pro subita eniro de l'kapitano, fariĝis en la barako alarmanta bruo. "Sed," iu el ni rimarkigis al Dubois, "vi enkonduke parolis pri teruraj konsekvencoj. Ni ĵus konstatis, ke via rakonto entute finiĝis kiel amerika filmo, kontentigante ĉiujn." -"Jes," Dubois koncedis," jes. Sed mi ankoraù ne ĉion diris. Aùskultu kaj vi komprenos. Do ĉar mi devis tiam pasigi ok tagojn en la "ombro", mi kompreneble ne povis, la postan dimanĉon, ĉeesti la sopiritan rendevuon kun belulino. Tiu fakto min dolorigis pli ol la karcerpajlo kaj mi petis helpon de mia amiko, la zuavo: "Vi estas kulpa pri tiu mizero. Do vi ne rifuzos al mi malgrandan servon. Iru dimanĉon al la rendevuo anstataù mi kaj senkulpigu min. Diru al la ĉarma knabino, kiom mi suferas, sed ke, pro disciplinaj kialoj mi ne povos esti apud ŝi." La zuavo iris. Kaj tiel bone li anstataùis min, ke poste mi neniam plu ion aùdis de mia feino. Mi ne bezonas aldoni, ke denun ankaù la zuavo, mia frata kunulo, laùeble evitis min. Tiel, per unu bato mi perdis amatinon kaj amikon." Kaj Dubois aldonis, verŝajne por ekskuzi sian emocion, "Tiuepoke mi estis juna..."

Ni komprenis. Ekzistas sentimentoj, kiujn oni devas respekti. Kaj sekvis ĝena silento, duonsincera paùzo. Kion diri?

Tiam Dubois denove malfermis la buŝon. Ĉi tiun fojon por trinki.

Raymond SCHWARTZ


POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO

Ŝlosilvortoj: KALKANUMO-HIPOPOTAMO-PANTOMIMO-SALAMANDRO-KATAFALKO-NUMISMATIKO-INDIFERENTA-INĜENIEROJ-SALIVO-VERMIĈELO.

Trovota aserto:"De kiam Adam kaj Eva manĝis la fatalan pomon, la homo neniam timis fari ĉiun pekon, kiun li povis."

KRUC-VORT-ENIGMO



Horizontale: 4. Konscia pri siaj meritoj - 6. Prepozicio - 8. Birdo - 10.Ducifera nombro - 11. Unucifera nombro - 12. Konifera arbo - 13. Antaŭpagi por gazeto - 14. Biblia virina nomo - 15. Titolo de interesa teatraĵo - 16. En ĉi tiu tempo - 17. Delikata odoro - 20. Diboĉa festeno - 22. Granda violkolora floro - 25. Malsupra trabo ĉe pordo - 28. Batalilo sangon soifanta - 30. Labori per la cerbo - 33. Prepozicio - 34. Eŭropa lando - 35. Grandega serpento - 36. Ĉiam verdaj arboj - 39. Juvelŝtono - 40. Feliĉega viro - 43. Kemia elemento metala - 46. Reĝa kapornamo - 48. Kemia elemento metala - 51. Bestoĝardeno - 52. Naĝbarelo - 53. Ĉefa persono en la domo - 54. Parto de parolo - 56. Interna buŝparto - 57. Ne pli ol - 58. Preni ion por uzi - 59. Ĉiela korpo - 60. Muzika teatraĵo - 61. Adorata statuo.

Vertikale: 1. Parazita besteto - 2. Vulkano - 3. Apartigi per mult-trua ilo 4. Koloro - 5. Estimego - 6. La mitologia pioniro de la flugado - 7. Restaĵo de detruita konstruaĵo - 8. Movi ion ĉirkaŭ ĝia akso - 9. Frato de la patro 18. Sudamerika ĉefurbo - 19. Prefikso - 21. Mezamerika ŝtato - 23. Denove - 24. Prefikso - 25. En alta loko - 26. Kanti laŭ alpana maniero - 27. Florfrakseno - 28. Strata muzikilo - 29. Vidilo - 30. Neversa - 31. Elegantkaraktera - 32. Kreado de fantaziaj bildoj - 37. Ripetu! - 38 Persona nedifinita pronomo - 41. Poseda pronomo - 42. Nombro - 43. Ovoforma - 44. Speco de kantverko - 45. Densigita oksigeno - 46. Objekto necesa ĉe vojaĝo - 47. Antikva greka monereto - 48. Reprodukti skribaĵon - 49. Simboloj de pureco - 50. Manĝata molusko - 55. Preĝfina vorto.

LA VIVO EN GRESILLON

Komitat-kunveno - Dimanĉon la 23-an de oktobro 94

Ĉeestis: D. Babin, P. Babin, F. Boyet, H. Boyet, B. Cheverry, G. Dairon, P. Métivier, P. Naulet, J. Vincent. Senkulpiĝis la aliaj komitatanoj.

Staĝoj 1994 - D. Babin rimarkigas, ke malmultaj partoprenantoj ĉeestis la diversaj staĝoj. En junio 20 personoj el kiuj nur 5 nefrancparolantoj. En julio, dum la unua staĝo 35 aliĝintoj. La ŝakaktivaĵo ne estis ĉeestata regule ĝis la fino de la periodo: 15 ĉe la komenco, 4 ĉe la fino. Por la dua julia staĝo la aliĝoj alvenis malfrue. 50 personoj ĉeestis la traduko-kurso. La gramatiko-kurso estis malregule vizitata. Por la aùgusta staĝo 40 personoj aliĝis. Jam fine de julio estis decidite nuligi la lastan staĝon ĉar nur 2 personoj aliĝis.

Feliĉe la Printempa Infan-renkonto estis sukcesa; almenaù kulture, ĉar la tarifoj proponitaj kaj la subvencio donita ne permesas grandan profiton. Sed dank'al la Sat-Amikara kongreso la enspezoj atingas la nivelon de la antaùa jaro koncerne la gastiga flanko. La aliaj enspezoj malkreskis; tamen ankaù kelkaj elspezoj malkreskis. La provizora bilanco montras, ke la financa stato similas tiun de 1993.

Staĝoj 1995 - La printempa Infan-Renkonto okazos de la 15-a de aprilo ĝis la 22-a. Se venos sufiĉe da partopreno-proponoj, dua renkonto estos organizita la postan semajnon sub gvidado de Monique Noël.

La kongreso de la Centrokcidenta federacio okazos en Grésillon la 1-an kaj la 2-an de aprilo.

Koncerne la someran programon estas decidite kalkuli kun la tendenco de la aliĝantoj restadi plej ofte nur unu semajnon. Jen la kalendaro: 1) 22-06 - 07-07: 1-a nivela kaj 2-a nivela kursoj (M.J. Berger kaj J. Vincent); manaktivaĵoj (J. Turbillon).

2) 08-07 - 22-07: tri diversnivelaj kursoj. La unua-nivela kaj la tria-nivela kursoj daùros du semajnojn; la unua semajno de la dua-nivela kurso konsistos el aktivado aù reaktivado de la konoj kaj la dua semajno el praktika konversacio. Okazos prelegoj pri la 100-jara datreveno de la invento de la kinearto kaj pri la influo de la mondmilito sur la esperanto-movado (prelegontoj estas kontaktitaj).

3) 23-07 - 5-a-08: tri diversnivelaj kursoj. Georges Lagrange gvidos semajnon pri la "arto traduki". Kimie Markarian proponis organizi "japanan semajnon" sed la preciza dato ankoraù ne estis elektita.

4) 05-08 - 19-08: tri diversnivelaj kursoj; unu semajno estos dediĉita al "praktika pedagogio".

5) 19-08 - 31-08: kursoj kaj diversaj aktivaĵoj.

Administros la staĝojn : D. kaj N. Babin, P. kaj L. Babin, R.Lenel, D. kaj J. Moirand, ge-Noulin.

Post artikolo aperinta en Kulturaj Kajeroj, pluraj legantoj sendis interesajn rimarkojn. La realigo de kelkaj el la sugestoj, kvankam saĝaj, postulas tempon kaj...monon. Aliaj estas jam nun realigeblaj. La propagandiloj estos reeldonitaj kun pli precizaj informoj koncerne la eblecojn praktiki sportojn en la proksimeco de la kastelo.Atentigota

estas ankaŭ la fakto, ke informoj estas haveblaj pere de minitelo, 36-15 Esperanto. Novaj afiŝoj estos disdonitaj en la turism-oficejoj de la regiono. Proksiman jaron enketo estos farita ĉe la partoprenantoj de la diversaj periodoj, por ricevi kritikojn kaj sugestojn.

M.T. Lloancy perletere diris sian bedaŭron, ke elĉerpiĝis la broŝuro "Naskiĝo de Esperanto-Domo". Ŝi sugestas fotokopiadon de malgranda kvanto da tiu broŝuro por ke la memoro de la historio de la Esperanto-Domo ne perdiĝu. Ŝi ankaŭ proponas la surbendigon de malnova filmo pri la unuaj jaroj de Grésillon kun aldono de komento. Bedaŭrinde tiu filmo estas en tre malbona stato; la surbendigo estos tre delikata afero. Tamen, profesiuloj estos kontaktitaj.

S-ino Gibez, kiu organizis plurjare konkurson de infandesegnaĵoj el diversaj landoj ne plu povas zorgi pri tiu tasko kaj proponis transdoni la respondecon al Grésillon. Paulette Naulet proponas mem daŭrigi tiun laboron.

La prezidanto fermas la kunsidon je la 17-a horo.

La sekretario: Guy DAIRON

La Komitato de la Esperanto-Domo dankas la legantoj de Kulturaj Kajeroj, amikoj de Gresillon kiuj sendis kritikojn, sugestojn, kuraĝigojn responde al la artikolo aperinta en la antaŭa numero de la revuo.

LIBRO - SERVO

Jus surmerkatiĝis tre bela ilustrita vortaro:

MIL UNUAJ VORTOJ EN ESPERANTO

Grandformata, 63-paĝa, kun tre solida kartona bindo, ĝi prezentas la vortojn kun la rilataj bildoj laŭ temoj; ĝi taŭgas kaj por infanoj kaj por kursgvidantoj, kiuj ĉerpos el ĝi materialon por konversacio. Fine de la libro, la mil vortoj estas alfabete ordigitaj, kun indiko de la paĝo en kiu troviĝas la rilata bildo. Tiele, infano povas facile retrovi la deziratan objekton. Prezo: 110 f.f. + afranko. Kiel kutime, pago post ricevo de la fakturo.

Mendoj: S-ino J. VINCENT, 26bis, rue de MILNGAVIE, 49150- BAUGÉ

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de Maupassant

esperantigis R. DUPUIS

bonega traduko de ĉefverko

Prezo : 36,00 FF

GRAMATIKO PER BONHUMORO



Ja, forgeso de la administracio !

Sinjoro, ni afable petas vin, ke vi indiku al ni, kie oni povas trovi ireblan promenadon ĉi tie.



Paŝo post paŝo

Ankoraŭ vi ! Jam dek fojojn mi diris al vi : ĝis revido, ĝis revido ! ĉu ni vetas pri kiu alvenos la unua ?



La bela vivo !

Vivu la libertempo ! Kia feliĉo ! Dum la tuta somero, ni profitos de ĉiuj dimanĉaj matenoj

---

La Modoj

INDIKATIVO : ĝi prezentas agon aŭ staton realan :
— **prezenco, preterito, futuro** (as, is, os)
— mi venis, mi kantas kaj mi foriros.

KONDICIONALO : montras, ke la ago dependas de iu kondiĉo aŭ estas nur probabla : US
— se mi estus sana, mi estus feliĉa.

VOLITIVO : U montras agon aŭ staton celatan, deziratan, volatan, ordonatan aŭ petatan :
— la esperanta volitivo respondas jen al la imperativo, jen al la subjunktivo de la eŭropaj lingvoj, laŭ tio, ĉu ĝi estas en ĉefa aŭ dependa propozicio :
— respondu la demandojn.

RIMARKO : la **optativo,** konata en la greka lingvo, montras deziron :
Vivu la reĝo ! tiel estu !

INFINITIVO : I montras la agon en plej ĝenerala maniero ! — ne ekpepi — planti en tia aĝo ! — li sentis sin fali.

Niaj perantoj

Aûstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aûstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : John C. Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent CT 15 7 Q B. (10 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joâo Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aû 25 internaciaj respondku ponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F - 49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.P.P.A.P. 71.404 Le Gérant : P. BABIN